



Kion mi faras por  
Esperanto

Pedro Fernández  
Rodríguez,  
Havano / 3

## Esperanto en la urbo de la elefantoj: CIENFUEGOS 2013

Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ

En la centra provinco Cienfuegos okazis de la 14a kaj ĝis la 16a de junio, regiona evento omaĝe al la Agotago de Esperanto en Kubo kaj al la 34-a datreveno de la fondo de Kuba Esperanto-Asocio.

Partoprenis kvindekda esperantistoj de sep el la dek tri provincoj de la lando.

Per bunta programo la organizantoj sukcesis kapti la atenton de ĉiuj partoprenantoj kiuj ne nur povis ĝui la etoson, sed ankaŭ lerni pere de ludoj, prelegoj kaj ŝercoj, novajn vortojn kaj esprimojn en Esperanto.

Dum unutaga laborsesio oni povis konstati la profiteblecojn de la Internacia Lingvo kaj ĝian utilecon ne nur en Esperantujo sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo. Ne mankis veturado al la strando Rancho Luna, tre konata kaj bela loko en Cienfuegos kaj kultura vespero, tiu ĉi, organizita en la

urba biblioteko, kie ni estis regalitaj per la arto de tre juna gitarensemblo de la propra urbo kaj kromaj prezentadoj de poemoj, muziko kaj rakontoj en Esperanto flanke de la partoprenantoj.

La teamo kiu gvidas la laboron de la E-Grupo en Cienfuegos tre harmonie, organizite kaj preparite laboris; nepre menciendas la nomoj de Alina Zuaznabal Himely, Yoelvis Liaño Liaño, Bárbara Borrell García, Denia López Fuentes, kaj Heberto García Fonseca.

Ili tre bone prizorgis ĉiujn bezonojn de iliaj gastoj, atentis kaj senkondiĉe helpis ĉiumomente.

Tiajn teamojn ni plu bezonas en Esperantujo, tia volo agadi por nia lingvo transdonas ĉiam agrablan hejman senton por esperantistoj kaj la certeco ke ni ne estas solaj.

Dankon kaj ĝis la!

### Ekspresa kurso: nova alternativo por alproksimiĝi al Esperanto

Julián HERNÁNDEZ ANGULO

La 19-an de majo deko da interese-itoj partoprenis Ekspresan Kurson gvidatan de instruisto Pedro Fernández Rodríguez en la Sidejo de KEA. Tiel, iom post iom, malfermiĝas alternativaj ebligantaj alproksimiĝon kaj eklernadon de la lingvo tra la tuta jaro kaj kreskon de la membraro.

La celo estas ke partoprenintoj de la Ekspresa Kurso poste rilatiĝu kun la lingvo pere de alispeca kurso (regula, perkoresponda, distanca, reta) kaj fariĝu vere aktivaj membroj.

Ege bonvenaj estas la klopodoj instrui la kurson tra la lando. Dankon al Pedrito, Miguel Ángel, Javier, Ismary kaj Julián, kiuj jam instruis ĝin en Havano kaj Mayabeque.



Ĉe la stadiono de la elefantoj (loka basbalteamo). Ekskurso al strando Rancho Luna. Koncerto de la gitarensemblo. Fotoj: Ariadna García Gutiérrez.



## KONCIZE EL...

**GUANTÁNAMO** | Burĝonas fakgrupoj: medicinistoj, naturamantoj, organiziĝas radioamatora grupo.

**SANTIAGO DE CUBA** | La Provinca Filio festis la Patrinaran Tagon kaj la 34-an Datrevenon de KEA.

**GRANMA** | Oni pretigas hispanlingvan bultenon *Amistad* pri Esperanto kaj la movado en Granma kaj en Kubo.

**HOLGUÍN** | Guillermo Ochoa Pacheco partoprenis E-aranĝon MEKARO en Kanado. Okazas baza kaj meza kursoj instruataj de Magda Rodríguez Almaguer kaj Isnel Pupo Peña.

**LAS TUNAS** | Okazas baza kurso, semo por revigliĝo de la tiea movado.

**CAMAGÜEY** | Raciél Prat Primelles esprimis sian pretecon reinstrui en Nuevitas kaj tiel helpi la revivigon de la movado en Camagüey.



*E-Grupo de Santa Clara. Foto: Arkivo.*

**SANTA CLARA** | Nova kurso komenciĝis la 13an de majo en Kulturdomo Juan Marinello de Santa Clara. Regulaj monataj aranĝoj okazas en Junula Komputilkubo. Dum festo, Porfirio Díaz prelegis pri la movado en Villa Clara kaj en Kubo; pri ĝi oni raportis en la radiostacio CMHW en Santa Clara. En la urbo okulfrapas la ciklotaksio de Gonzalo Martín Olmo, kiu ornamas ĝin per E-flagoj kaj glumarkoj por diskonigi Esperanton.

**CIENFUEGOS** | La Provinca Biblioteko oficialigis programon de ĉiumonataj aranĝoj de la E-grupo kaj informas pri Esperanto kaj kiel lerni ĝin en Cienfuegos. La Centra Renkontiĝo estis granda sukceso. (*vd. p. 1*).

**MATANZAS** | Alejandro Tilán González prelegis pri Esperanto en municipo Calimete en kies biblioteko okazas somera E-kurso instruata de Vilhelmo Lutermano.

**MAYABEQUE** | Olyanlis Gutiérrez Rolo organizis ekspresan kurson en Jaruco kaj informis pri aliaj E-kursoj en Havano.

**HAVANO** | Okazas tri kursoj en Centra Havano, tri kursoj en Diez de Octubre en la sidejo de KEA, unu el ili por instruantoj. La Provinca Filio preparis someran programon.

**ISLA DE LA JUVENTUD** | Tomás Rodríguez Lima daŭre instruas kaj varbas por Esperanto.

## KEA 34-jara: preta por novaj defioj

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

*Per granda kaj bela festo en la korto de sidejo de KEA en Havano, kiun partoprenis proksimume 90 esperantistoj, konfirmiĝas la sento ke la kuba movado daŭre viglas, rejuniĝas kaj refortiĝas cele al novaj defioj. Ni ne povas preteratenti tiun ĉi unikan okazon preparoli aliajn momentojn de la vivo esperantista en nia insulo.*

Ĉi-jare, kiam Kuba Esperanto-Asocio festis la 34an Datrevenon, estas oportune rememori pri kelkaj gravaj okazintaĵoj kiuj kunformas la historion de la kuba E-movado.

Ekzemple, en 2004 la kubaj esperantistoj omaĝis la centariĝon de Esperanto en Kubo, kies starpunkto frue en la pasinta jarcento estis universitatoj.

Pri kursoj en tiuj fruaj jaroj ni malhavas multajn informojn, tamen la tiamaj esperantistoj estis senlacaj propagandistoj, inter ili, la tre konata kuba intelektulo, etnologo, verkisto, ĵurnalisto, homo tre klera kaj influhava en la intelektulaj medioj, d-ro Fernando Ortiz. El tio eblas supozi ke Esperanto fariĝis konata ĉe intelektulaj kaj universitataj medioj.

En la dua jardeko de la pasinta jarcento, kiam oni fondis en Ha-

vano la Popolan Universitaton José Martí, tie studis talentaj junuloj kaj poste estiĝis generacio de verkistoj kaj artistoj tre rekonataj en la kuba socio. Tie okazis E-kurso, la unua pri kiu ni havas informojn.

La kuba verkisto, jam forpasinta, José Antonio de la Osa, verkis libron en kies enkonduko li rakontis pri tiu kurso kies instruisto estis la poldevena esperantisto Elías Jonovski Johns, kiu poste verkis kaj defendis diplomigan universitatan disertaĉion pri Esperanto kiel helplingvo internacia.

Se ni retroiras en la tempo, ni povas konstati ke la nuna Kuba Esperanto-Asocio naskiĝis, ĝuste la 16an de junio de la jaro 1979, de post multa sindediĉo kaj tenaceco de niaj antaŭuloj; ili instruis la lingvon al ni, kaj ankaŭ donis al ni la semon de io interna nutranta la movadon, iom da idealismo kaj inspiro.

Nuntempe, la asocio devas labori por kreski, rejuniĝi kaj trovi novajn manierojn allogi la homojn al nia sino. Pro tio, en tiu ĉi 34a Datreveno de Kuba Esperanto-Asocio kaj Agotago por Esperanto, ni gratulas la kubajn esperantistojn. Longan vivon al KEA.



*«Tiel la mondo iras» kun Juliano kaj ĉeestantoj, laŭ kies ritmo oni plue improvizis spritajn frazojn. Foto: Ariadna García Gutiérrez.*

# La poezia arto de Martí

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

**D**um multaj jaroj, José Martí [hose' marti'], nomata la Apostolo, kunlaboris kun diversaj periodaĵoj de sia epoko per plurspecaj artikoloj kaj temoj, fervore oratoris kun la celo unuigi fortojn por definitiva batalo kontraŭ la hispana koloniismo, verkis intimajn kaj politikajn leterojn, postlasis gravegajn dokumentojn kiuj kolektas lian vidpunkton pri pluraj aspektoj de la realo travivita, verkis poemojn, romanojn, teatraĵojn, recenzojn. Liaj tekstoj estas tradukitaj al pluraj lingvoj kaj eldonitaj de multaj fremdaj eldonejoj.

La harmonia emsemblo kiun formas lia konstanta agado por liberigo de Kubo kaj de Ameriko – agado bazita sur solida revolucia ideologio – kaj lia enorma verkaro, igas la figuron de José Martí unu el la plej transcendantaj kaj signifoplenaj de la amerika beletro.

José Martí estas konata kiel elstara patrioto kaj revoluciulo, naskiĝinta en Havano la 28an de januaro 1853. La eksterordinara pensado de Martí, tre klara kaj certa pri la estonteco de Kubo, igas lin aktuala kaj viva en la kuba popolo.

Li estis poeto, verkisto, ĵurnalisto, sed ĉefe organizanto de la nomata «necesamilito» por batali «ne kontraŭ la hispanoj, sed kontraŭ ties sistemo kaj kolonia regado», kio evidentiĝas lian elstaran klarvidon.

La 19an de majo 1895 José Martí forpasis dum batalo en loko nomata Du Riveroj, en la orienta parto de la insulo.

Sendube rekonata genio, José Martí, la kuba apostolo, troveblas ĉie en la kuba nuntempa socio kaj estas unu el tiuj homoj kies elvoko profunde povas tuŝi la plej intimajn kordojn de la insula apartensento.

Lin oni konsideras, kune kun la meksikano Gutiérrez Nájera kaj la kolombiano José Asunción Silva, la renoviganto de la hispanamerika verso kies kulmina figuro estas

Rubén Darío, iam deklarinta, ke neniu alia verkisto tiel influis lian stilon kaj koncepton de la poezio kiel Martí.

Pro organizaj taskoj de Martí rilate la preponon de la sendependiga milito, li partatempe okupiĝis pri verkado kaj nur tiel oni eksplikas la tiom malmulta publikiga laboro de la Martí-aj verkoj. Malgraŭ tio, li speciale atentis du etajn volumojn, kies eldonon li sukcesis vidi, nome *Ismaelillo* de 1882 kaj *Simplaj Versoj* de 1891 en kies antaŭparolo li esprimas, ke tiuj versoj estas rezulto el kora sento, senartifikaj kaj ne publikcelaj. Tamen, legante tiajn versojn oni malkovras la esencan homecon de viro sentema pri ĉio vivanta kaj okazanta ĉirkaŭe.

XXV

*Pensas mi, kiam mi ĝojas  
Kvazaŭ lerneĵano simpla,  
En la kanario flava,  
Kies okulo tiom nigra!*

*Volas mi, kiam mi mortos,  
Sen patri', ankaŭ sen mastro  
Ekkuŝu sur mia tombo  
Florbukedo – kaj la flago!*

Unu el la grandaj vivo-inspiroj de Martí estis la filo, al kiu li dediĉis unu el la plej belaj kaj bonkvalitaj poemplibrojn hispanlingve verkitaj. Li nomis ĝin *Ismaelillo*, kaj konsistigas veran ateston pri fido kaj amo.

En la dediĉaj paroloj Martí elvortigis la jennon: «Filo mia, timigite de ĉio mi rifuĝas en vi. Mi fidus je la homa boniĝo, je la futura vivo, je la utileco de virto kaj je vi...».

En tiu kolekto li elverŝis sian patran amon kiam la filon li nomas «Mia kavaliro» aŭ en alia poemo nomata «Songo veka».



## Songó veka

*Songas mi per okuloj  
Apertaj, tage kaj  
Nokte, songas mi ĉiam.  
Kaj super la ŝaŭmoj  
De l' vasta mar' malkvieta  
Kaj ene de la krespaj  
Sableroj de l' dezerto,  
Kaj de leon' potenca,  
Monarko de mia brusto,  
Ĝojoplene rajdanta  
Sur kolo obeema  
Infano min vokanta  
Flosante ĉiam venas!*

## Kion mi faras por Esperanto Pedro Fernández Rodríguez, Havano

★ Instrui estas esenca maniero kontribui al disvastigo de Esperanto mialande. Jen bazaj kursoj, jen kursoj por progresantoj, por tradukemuloj, por gejunuloj, instrui estas unu el miaj plej konstantaj agadoj laŭlonge de mia esperantista vivo; ★ Kiel amanto

de kulturo ĝenerale, mia laboro ankaŭ transiras la klasoĉambron kiam mi tradukas, verkas aŭ deklamas monologojn aŭ poemojn en kaj ekster Esperantujo okaze de kulturvesperoj kaj aliaj eventoj; ★ Nuntempe, mi instruas la duan (bazan) nivelon en Centro Habana kaj ankaŭ la unuan nive-

lon por grupo de triaĝuloj, kiu funkcias kiel klubo, ĉar ni babilas ĉe teo kaj biskvitoj kaj antaŭ ol komenci la lecionojn kelkfoje, hispanlingve, mi dividas kun ili enigmojn por menstrejnado. ★ Krome mi intencas organizi meetiejon pri rakontado, depende de ilia intereso.



## Lingva diverseco en Latinameriko: faktoj kaj minacoj

(Fina parto)

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

La amerika kontinento estas granda lingva mozaiko kiu instigas multajn fakulojn sin demandi kiel administri tiun ĉi multlingvismon. Kiajn kriteriojn sekvi por garantii konservadon de lingva ekologio ene de integra spaco? Kaj konsekvence al la nunaj socipolitikaj evoluoj, al kiaspeca integriĝo oni devas aliĝi: ĉu al inkluziva aŭ ekskluda integriĝo? Oni devas scii ĉu niakaze lingva diverseco kaj plurlingvismo estas faktoro evolupova aŭ retroira.

Por granda parto de Ameriko kaj tre speciale por Latinameriko, la procezo de «eltrovo» kaj konkero komencita de post 1492 altrudiĝis la unuan grandan skismon en ĝian tutan hejmon, inkluzive de la lingva tradicia hejmo. La lingvoj angla, franca, hispana kaj portugala, kiuj akompanis siajn respektivajn imperiojn, produktis aliajn skismojn en la regionoj kie ili altrudiĝis.

Nuntempe tiuj lingvoj klasifitaj inter la plej parolataj en la mondo, apartenas al politikaj institucioj forte strukturitaj kaj estas oficialaj lingvoj en internaciaj organizaĵoj. Apriorie, ne ekzistus kialo por pridubigi kvarlingvan projekton de kontinenta integriĝo kaj edukaj politikoj, tamen, ĉu tiuj lingvoj per si mem spegulas la kulturan kaj lingvan filon de Ameriko? La realo estas ke oni apenaŭ havas proksimuman nombron da lingvoj ankoraŭ parolataj en la kontinento, oni povas, tamen, diri, ke la plimulto de pramerikaj lingvoj, forte markitaj de la stigmo de longa koloniado, trovas sin reduktitaj al la kategorio de minoritataj lingvoj, komdamnitaj je socia periferio de ties parolantoj, diskriminaciataj, aŭ en plej bona okazo, transformitaj en ekzotikaĵojn, lontanajn eĥojn de pasinteco konkerita kaj venkita.

## Nekrologo

**Jesús Andrés Castillo Jiménez** (1938-2013) mortis la 2-an de majo en Havano. Li estis la dua prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio kaj oficis 1986-1991. La plej elstara evento de tiu periodo estis la 75a UK en Havano, kies organizadon li gvidis kiel prezidanto de LKK. Kuba Esperanto-Asocio kondolencas al familianoj kaj amikoj.



Sur la foto, de dekstre, s-ro Jesús Castillo Jiménez kun la ankaŭ forpasinta estrarano de UEA, d-ro Otto Haszpra dum oficiala stampado de unuataĝaj kovertoj okaze de la 1a Kongreso de KEA, Teatro Mella, Havano, 1987. Foto: Arkivo de KEA.

esperanto  
CUBA



www.lernu.net



**RADIO HAVANO KUBA**

Kurtondaj kaj retaj elsendoj

www.radiohc.cu/eo



**esperanto.cu** estas trimonata eldonaĵo sendita al komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo [www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu). **Redaktis:** Alberto F. Calienes, Maritza Gutiérrez kaj Javier Ramos. **Enpaĝigis:** Alberto F. Calienes kaj Y. Mayol.

esperanto  
CUBA